

Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2001 numero 5-a: novembro / decembro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: gacond@bluewin.ch

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude GACOND

Redaktora kunlaboranto: Richard SCHNELLER.

2 gravaj kunvenoj

Novembre 17

La Chaux-de-Fonds, Regiona SES-CDELI-kultura sabato

La bibliotekistino Martine SCHNELLER demonstras, kiel ekde nun la kolektoj de CDELI estas interrete konsulteblaj. Claude GACOND raportos pri la konkuro inter diverstipaj projektoj de planlingvoj, kiu karakterizis la 20-an jarcenton. Kia estas la internacia lingva realaĵo enire de la 21-a jarcento? Ĉu eble tutmonda dulingvismo helpe de la interregistara angla kaj interetna esperanta lingvoj? Mireille GROSJEAN raportos pri la romanĉlingva situacio, kiun karakterizas la ekuzo de planita interromanĉa idiomo. Responde al demandoj Jean-Thierry VON BÜREN komprenigos, kion esperanto povas alporti al poligloto. (Vidu la paĝojn 10-11-ajn.)

Decembre 8-9

Zürich, Regiona SES-ESZ-kultura semajnfino

Kun Vera POCHANKE jarkunveno de Junularo Esperantista Svislando, kun Claude GACOND rendezuo kun Karolo PICH, bunta vespero kun teatro, muziko, danco kaj esperanto-librovendo, literatura matenmanĝo, kunveno de esperanto aktivuloj. (Vidu la paĝojn 12-14, 25 kaj la aldonitan verdan informilon).

Rememorigilo

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301,
8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25. Retpoŝto:
info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13,
2300 La Chaux-de-Fonds. ☎: 914 39 34.
Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj junul-
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:
chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

SES informas

Redaktaj datlimoj

Numero 2002-1 (januaro-februaro):
15-a de decembro 2001.

Numero 2002-2 (marto-aprilo): 15-a de
februaro.

Svisa kalendaro

Novembre

- 05: Genève: kunveno de La Stelo.
- 05: Lausanne: LES-kunveno.
- 07: Wil: EKW-kunveno.
- 10: Luzern: SAEF: GERI-renkonto.
- 13: La Ch-de-Fds: studrondo.
- 13: Zürich: ESZ-kunveno.
- 15: Luzern: LES-kunveno.
- 17: La Ch-de-Fds: Kultura sabato
organizita de SES kaj CDELI.
- 22: Basel: ESB-kunveno.
- 27: La Ch-de-Fds: studrondo.

Decembre

- 04: Genève: kunveno de La Stelo.
- 05: Luzern: LES Zamenhofa festo.
- 05: Wil: EKW Zamenhofa vespero.
- 08: Zürich: Asembleo de JES.
- 08-09: Zürich: Orientsvisa kultura
semajnfino organizita de SES kaj ESZ.
- 11: La Ch-de-Fds: studrondo.
- 15: Basel-Muhlhouse: Zamenhofa festo
de ESB.
- 15-16: La Ch-de-Fds. KCE: Hilelismo.
- 15: Redakta datlimo por *SES informas*
- 16: Lausanne: LES Zamenhofa festo

Jaro 2002 Januare

- 02: Wil: EKW-renkontiĝo.
- 07: Lausanne: LES-kunveno.
- 08: La Ch-de-Fds: studrondo.
- 08: Zürich: ESZ-kunveno.
- 18: Luzern LES-kunveno
- 19: La Ch-de-Fds CDELI studsabato.

22: La Ch-de-Fds: studrondo.
24: Basel: Ĝenerala jarkunveno de ESB.

Februare

04: Lausanne: LES Ĝenerala kunveno.
05: Genève: kunveno de La Stelo.
06: Wil: EKW-kunveno.
12: La Ch-de-Fds: studrondo.
16: La Ch-de-Fds: CDELI studsabato
20: Redakta datlimo por *SES informas*

Marte

04: Lausanne: LES-kunveno.
05: Genève: Ĝenerala jarkunveno de La Stelo.
12: La Ch-de-Fds: studrondo.

16: La Ch-de-Fonds: CDELI: Prelego de Renato CORSETTI, prezidanto de UEA.

Aprile

03: Genève: kunveno de La Stelo.
06: Luzern: Jarkunveno de SES kaj 75jara jubileo de LES.
08: Lausanne: LES-kunveno.

Maje

07: Genève: kunveno de La Stelo.

Junie

04: Genève: kunveno de La Stelo.

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 15-a de decembro, por ke ili troviĝu en la taŭga rubriko kaj en la svisa kalendaro de "*SES informas*" 2002-1 (januaro-februaro).

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno

La ĝenerala kunveno de SES okazos en Luzern la sabaton 6-an de aprilo 2002 kombine al la 75-jara jubileo de la fondo de Lucerna Esperanto-Societo.

Protokolo

Kunsido de la grup-vidantoj
Bern, la 13-an de oktobro
anoncita en SESi 2001-4

Ĉeestas: Nicole BEROUD,
Esperanto-Societo Basel: NB,

David BÜHLMANN, Laŭzana Esperanto-Societo: DB,
Gertrud EGGENBERGER, prezidanto de SAEF: (Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj): BE,
Claude GACOND, La Chaux-de-Fonds kaj CDELI: CG,
Ernst GLÄTTLI, SAEF: EG,
Bruno GRAF, SES: BG,
Andy KÜNZLI: AK,
Elisabeth LAUPER, SES: EL,
Nicole MARGOT, SES: NM,
Paul SCHERER, Lucerna Esperanto-Societo: PS,
Christiane SIXTUS-POT, Esperanto-Grupo "La Stelo", Genève: CS,

Veronika POCHANKE, JES: (Junularo Esperantista Svislanda): VP,
Barbara POCHANKE: BP,
Stanislaw POCHANKE, Esperanto-Klubo Wil: SP,
Dietrich WEIDMANN, Esperanto-Societo Zürich kaj SES: DW,

Senkulpiĝoj:

Alfred WENGER, Neuchâtel.

Mireille GROSJEAN, ILEI.

François RANDIN, Lausanne.

Saluto:

Bruno GRAF, prezidanto de SES, salutas la ĉeestantojn: Kun granda plezuro ni povas konstati, ke preskaŭ ĉiuj lokaj kaj fakaj societoj respondis al nia invito. Ni aparte ĝojas pri reprezento de JES, kies advokon ni povis legi en la lasta numero de "SES informas". Tiu kunveno ankaŭ povus havi, kiel titolon: kunlaboron aŭ interkonsiliĝon. Ni estos pli efikaj, se ni kunlaboras kaj SES deziras pli aktive stimuli tiun kunlaboron. Ĉiu havas sian propran kompetenton: SES sur la nacia nivelo, subvencianta lokajn agadojn, eldonante materialon, informilojn, bultenon. La lokaj societoj sur la regiona plano, organizas kursojn, lokajn renkontojn kaj prelegojn. Danke al Claude GACOND ni disponas pri bela informilo: "*SES informas*" (SESi), kiu kunligas nin. Ni notu, ke ĉiu numero postulas al nia redaktoro

unu plenan semajnon de laboro nesalajrita. Ni dankas nian kasistinon Elisabeth LAUPER, kiu helpas por la adresigo.

Informado-varbado: (Vidu SESi 2001-4.)

BG: Premiere ni povas prezenti al vi varbilon en la germana lingvo ĵus presitan kun la grafika kunlaboro de Ernst ROLF. Vidu unue, ke ĝi evitas la nomon *-esperanto-* sur la unua paĝo, sed alparolas la leganton per ĝoje venkema sinteno: "*Heureka!*" La unua paĝo prezentas la problemon: lerni lingvojn estas bele, tiun studon ni povas raciigi per esperanto, klasika, neŭtrala, nepolitika. Je la dua paĝo oni prezentas la alternativon *-esperanto-* komparante ĝin kun aliaj mondlingvoj naturaj. Je la tria paĝo stariĝas la demando: *kial homoj lernas esperanton?* La lingvo estas prezentita en si-mem, kiel fenomeno. Ni decidis meti mal multe da teksto kaj eviti ĉian blufon. Ĉar propagandilo rapide eksmodiĝas, ni mendis nur 3000 ekzemplerojn. Tiu malalta eldonkvanto bedaŭrinde pli kostigas la varbilon kaj vi povos ĝin aĉeti je po 25 centimoj (al SES ĝi kostas la duoblon). Por nur po 10 centimoj vi povas mendi la varbilon de la Germana Asocio, kiu pli taŭgas al junuloj. Por ricevi pli kompletan informilon vi povas mendi tiun de

Dieter WEIDMANN je la kosto de po CHF 1.

CG demandas pri la adreso troviĝanta sur la svisa varbilo, konstatante ke ĝi estas ege simpla.

BG: Tio venas de interkonsento kun la poŝto.

CS parolas pri la franclingva versio: Ĝis nun la francparolantoj ne petis al SES eldoni varbilon. Tial la ĝenevanoj uzas tiun de "Espéranto-France". Ĝi malmulte kostas: po 15 centimojn. Por la junuloj ni konsilas "*Le meilleur moyen de goûter aux langues étrangères*"

VP: JES ricevis tutan pakajon de tiu ĵus menciita varbilo.

CG: Koncerne pakajojn: en CDELI ni ricevas arĥive similajn pakajojn kun varbiloj de antaŭ 40 jaroj. Do ni atentu uzi la varbilojn, kiam ili ankoraŭ aktualas!

Aktiveco de la societoj:

Ĉiu loka klubo prezentas sian aktivadon.

Esperanto-Grupo "La Stelo", Genève: La 26-an de septembro Claude PIRON prezentis en la universitato de Genève "La veron pri esperanto". Pasintjare ni jam okazigis publikan prelegon de Claude PIRON, sed tiam ni evitis uzi la nomon *-esperanto-* en la titolo. Tial venis malpli da homoj ĉi-jare, sed ĉiuj venintoj estis rekte interesataj al la Lingvo Internacia. 12 ĉe-

estantoj aliĝis al la kurso por komencantoj. Por atingi tiun rezulton necesis multe varbi. Ni disdonis entute 3'570 flugfoliojn kaj metis 6 anoncojn en la plej gravaj gazetoj. La anoncoj kostis CHF 2000, dum la presado de la flugfolioj elspezigis CHF 700. Ni kolektis la adresojn de la ĉeestantoj por lotumado, premiante la gajnantojn per la libro de Claude PIRON "*Le Défi des Langues*". Unu premio venis al la kurso, ĉar ŝi ricevis la libron.

CG rimarkas, ke ĉiu nova esperantisto kostas minimume CHF 300.

CS: SES subvenciiis nin per CHF 1'000 kaj la membroj de la societo kontribuis per donacoj de CHF 1'200. Estas interese rimarki, ke kiam ni petas monon al la membroj por preciza celo, ili volonte donacas.

BG konkludas: Se ni povus reklami kun la financaj rimedoj de granda entrepreno, la rezulto estus bonega. Ekzistus evidenta ŝanco por nia produkto, se ni havus monon.

Laŭzana Esperanto Societo: SESi, en sia lasta numero, raportas pri la sukcesa agado de Stephane KELLER en la politeknika universitato EPFL: sukcesa kurso kondukis al fondo de Esperanto-Grupo EPFL, oficiale agnoskita de la altlerneja estraro. Claude GACOND kaj Claude PIRON estas la

anoncitaj prelegontoj. Same en SESi vi trovis raporteton pri ekspozicio starigita en la lernejo Migros fare de François RANDIN. Kursoj sekvis.

Esperanto-Societo Basel:

NB raportas, ke la societo kutimas anonci kurson en la dumonata magazino "Colour-K", kiu proponas diversajn aktivajojn al junuloj. La anonco kostas nenion. 6 junuloj aliĝis al kurso. Oni petis al ili CHF 40 por la tuta kurso, sed rekompencis per nepago tiujn, kiuj venis ĉi-vespere. En la apudlima komunumo Weil esperanto estas instruata en klaso.

Lucerna Esperanto-Societo:

PS bedaŭras, ke de longe ne plu sukcesas kurso en Lucerno. Sed aperis intervjuo pri esperanto en loka gazeto. Stariĝis interesaj rilatoj kun studento, kiu volas abiturientiĝi kun diplomalaboro pri esperanto. Tiu junulo tute pozitive rilatas al nia lingvo. Venontjare LES festos sian 75-an jubileon. Tiucele oni volas reaperigi artikolon de Andy KÜNZLI pri la societo. La membroj regule kunvenas, sed bedaŭras la mankon de junuloj.

Esperanto-Societo Zürich:

DW konstatas, ke la societo meznivele laboras kompare kun la sukcesoj de la lastaj jaroj. La 26-an de septembro estis organizita

publika prelego fakte sufiĉe diskreta. Sed gravas, ke ĉeestis reprezentanto de la Mondfederacia Movado, kun kiu la zurikanoj havas intensan kunlaboron. Kaj tiu movado metis la Internacian Lingvon en sian statuton. La societo anoncis kurson al kiu venis nur 3 aliĝoj. La 8-9-an de decembro okazos la Regiona Kultura Semajnfino de SES, kun la Ĝenerala Asembleo de JES.

BG laŭdas la bonegan montrofenestron, kiu prezentas nian lingvon el la oficejo de DW. Li rimarkas, ke al la zurika retadreso venis 2'000 informpetoj en unu jaro. Bonega laboro, kiu kvazaŭ ne kostas.

Esperanto-klubo Wil: En marto estis organizita provleciono de esperanto. Oni propagandis per gazeto kaj turisma informilo. La rezulto ne estis tre kontentiga. 4 personoj venis al la kurso. Plie redaktoro de loka gazeto intervjuis Veronikan POCHANKE kaj aperigis pri tio artikolon.

St. Gallen: Okaze de la Jaro de la Lingvoj konkurso pri konoj de lingvoj estis organizita. Multaj lingvoj estis reprezentitaj. Ĉar unu kandidatiĝis por esperanto, oni petis esperanto-parolantojn kiel ekspertojn. Sed finfine la kandidato

ne venis. Tamen tio estis okazo montri la ekziston de nia lingvo.

Junularo Esperantista Svislanda: En SESi estis anoncita la reviviĝo de JES kun ĝia Ĝenerala Asembleo la 8-an de decembro, kie oni multe esperas pri reaktiviĝo de JES.

Neuchâtel - La Chaux-de-Fonds: Por la tuta kanton okazas rondo de studentoj marde en CDELI. En la lernejo "La Grande Ourse" Olivier TZAUT instruas kun CG kaj aliaj 2 instruistoj de la lernejo mem. La Tagon de la Lingvoj Mireille GROSJEAN disdonis informilojn.

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj: Aperas nova serio de anoncoj en la gazeto de la fervojistoj. Komence de septembro EG estis kontaktita de instruistino por studsemajno pri paco. Tie EG povis paroli pri esperanto antaŭ klaso. La infanoj kaj la instruistoj estis entuziasmaj kaj sendis al EG desegnaĵojn pri la lingvo kaj infano demandis, kie oni povas lerni esperanton.

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia: La interbiblioteka retsistemo RERO instaligās. La vizito de Herbert MAYER, la direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien certe

akcelis tiun ĉi instaladon, kiu ebligas la perretan konsultadon de la kolektoj de CDELI fare de bibliotekoj kaj de unuopuloj. Martine SCHNELLER ekde la komenco de la venonta jaro estos dungita kiel bibliotekistino de CDELI fare de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. CDELI devis respondi 3 aŭ 4-foje al interesitaj ĵurnalistoj kadre de la Jaro de la Lingvoj. (vidu SESi 2001 no 4).

Diskutoj:

Fine de tiu prezento BG diskutigas la daton de la venonta Ĝenerala Kunveno de SES. Ĝi povus okazi la 6-an aŭ la 13-an de aprilo kaj koincidi kun la jubileo de la lucernanoj.

AK, kiu denove kotizas al SES gratulis al CG pro lia membra honorigo en UEA. Li informas pri la *Enciklopedio*, kiu aperos aŭtune de 2003 por festi la jubileon de SES. En Ĝenevo li reprezentas UEA-n en la Komitato de la Ne-Oficialaj Organizoj). Ne tre aktiva medio, kiu ĉefe observas, kio okazas en la mondo.

Ni alvenas al la ĉeftemo: Interligi ĉiujn. (Vidu SESi no 4).

CG analizas la situacion: en la 20-a jarcento la sinteno de SES estis, ke nur la kotizantoj ricevadis la gazeton aŭ informilon. Nun ni

devas evoluigi tiun sintenon kaj sendi la organon SESi al ĉiuj interesatoj sendepende de la kotizoj. Tiu nemulte kosta varbilo alportas donacojn.

Malfermiĝis diskuto inter CS kaj CG: ĉu simpla bulteno de la loka societo, kun sia programo povas sufiĉi al la informado de la redaktoro de SESi.

CG opinias, ke ne. Li perdis tempon serĉante informojn tra ĉiu loka bulteneto, kies aperdato ne koincidas kun tiu de SESi..

DW demandas sin ĉu efikas, ke ĉiu loka societo produktu propran bultenon. Ĉu ne unuigi nian forton kunlaborante por unu sola bela gazeto.

EG sendis artikolon akurate, ĝi ne aperis.

CG: pensu, ke foje mankas loko en iu numero. Tio signifas, ke mi devas foje prokrasti aperon de artikoloj. BG konstatas, ke esperanto-societoj ne funkcias normale kiel firmaoj, ĉar ĉiu laboras bonvole, eksterprofesie, ni devas do simpligi. La bultenoj devus sufiĉi por informi la redaktoron pri la lokaj programoj. Grava demando: ĉu la grupoj disponigu sian adresaron, por ke nemembroj de SES kaj komencantoj ankaŭ ricevu la organon SESi? Ĝenevanoj kaj bazelanoj ne pretas fari tion, timante, ke iliaj membroj sentu tiun

sendadon kiel trudon. Ĉu la instruistoj de esperanto devus unue peti la permeson al la lernantoj por doni iliajn adresojn?

BG: kompreneble SES petas, ne postulas, kaj mi proponas al la lokaj grupoj diskuti tion dum siaj kunvenoj. Ni tamen povas proponi, ke komence al la sendo de adresaro fare de lokaj kluboj, SES sendu sian propran liston al ili. En tiu listo la lokaj kluboj povus eventuale trovi adresojn de esperantistoj ankoraŭ ne konataj de ili. Tiel stariĝus vera interŝanĝo.

DW emfazas la financon aspekton de tiu interŝanĝo de adresoj kaj de sendado de SESi al nekotizantoj. Tio donas la eblecon varbi pli ŝpare: sendo de gazetoj al interesatoj kostas malpli ol anoncoj en gazetoj, kaj atingas pli efike la celon. La sumo dediĉita al varbado, flanke de SES, estis altigita, kaj povas esti uzata al tiu sendado.

BG: laŭ mia koncepto tiu sendado devus okazi nur 1 aŭ 2-foje jare, kaj kiam aperas naci-ligva teksto en la sendata bulteno.

CG ne konsentas: La komencantoj ŝatas kolekti kaj posedi tutan kolekton.

BG: ni komencu, ni provu. La lokaj grupoj bonvolu respondi al SES ĝis jarfino pri la interŝanĝo de adresaroj.

DW: ni faru kompromison: se la nombro kreskas, ni devos rediskuti la problemon. Kombinitaj kotizoj. (Vidu SESi no 4).

BG: Laŭ mia opinio la bezono de kombinitaj kotizoj ne vere ekzistas. La grupoj ofte ne bone fartas. Mankas kasistoj. Ni devas simpligi.

DW: Mi volas, ke SES prenu sur sin la laboron de la lokaj kasistoj. La SES-kasisto laboru por la lokaj grupoj. Lokaj grupoj rezignu pri iom da suvereneco cele al pli da efiko. Tiu propono kompreneble ne koncernu la fakajn organizaĵojn, sed ĉefe koncernu lokojn, kie estas nur 1 aŭ 2 esperanto-parolantoj, kiel ekzemple: Locarno, St.-Gallen, Wintherthur, ktp.

CG mencias la fakton, ke la kantona divido ne ĉiam koincidas kun la realo de la ekzistantaj esperantistoj. Ĉu Laŭzano, ekzemple, vere povas esti la centro de la tuta vaŭda kantono?

NM opinias, ke la ekzemplo ne estas tre bone elektita, ĉar ŝajne vaŭdanoj volonte vojaĝas al Laŭzano. Plie ŝi pensas, ke la ideo pri kombinitaj kotizoj povus esti interesa. Pluraj plendas devi pagi tiom da kotizoj, sed tiu ideo eble ne maturas. La lokaj kluboj ne devas kredi, ke SES volas gluti ilin. SES male volas esti je ilia servo por pli da efiko.

BG konsiderante, ke tiu temo ne estas la prioritato de SES, proponas al la lokaj prezidantoj diskuti tion kun siaj membroj kaj raportu pri ĝi jarfine.

CG memorigas, ke li volonte venas laŭ peto por okazigi ekzemple 4-foje jare studgrupon.

SP demandas, kio estas la nuna situacio de korespondaj kursoj.

CG reverkas la franclingvan, kiu nun refunkcias kaj eĉ estos kaptebla rete. Sed la germana versio mankas. Ekzistas germanaj kaj aŭstriaĵ versioj, kiuj devus esti reaktualigitaj.

BG konkludas gratulante al JES pri esperebla revekigo. Li rememorigas la datojn de la Regionaj Kunvenoj: 17-an de novembro en La Chaux-de-Fonds kaj 8-9-ajn de decembro en Zürich. Li dankas ĉiujn por la ĉeesto kaj partopreno kaj konstatas la bezonon de tia kunveno.

La protokolinto: Nicole MARGOT
Lausanne, la 19-an de oktobro 2001

Novaj varbiloj

Esperanto ne estas lingvo, kiu disvastiĝas sufiĉe denaske. Des pli ni devas informi kaj varbi, por ke oni konu kaj lernu ĝin. Unu el la rimedoj estas modernaj varbiloj. SES disponigas ilin je reduktita prezo.

La varbogrupo ellaboris novan germanlingvan varbilon, kiun vi ricevas ĉi-kune. Rolf ERNST prizorgis la grafikumadon kaj presadon. "*Heureka*" estas ĝia batvorto. Ni priatentis jenajn merkatakajn kriteriojn:

- Eviti la nomon esperanto sur la frontpaĝo.
- Komenci per problemo, daŭrigi per la solvo.
- Limigi la tekston al la plej necesa.
- Reliefigi la specifan karakteron de esperanto kompare al mondlingvoj.
- Eviti blufojn kaj prezenti faktojn.

Ĉefaj argumentoj estas la praktik-eco kaj raci-eco, malpli politikaj kaj idealismaj ideoj. En plurlingva lando oni kutimas lerni fremdlingvojn kaj apenaŭ sentas lingvan diskriminacion. Tiu varbilo celas plenkreskulojn. Ni uzas aliajn varbilojn por la junularo.

La prezo estas po 25 centimojn (la duono de la realaj kostoj). Mendebla ĉe la prezidanto (adreso sub SES-estraro), minimume po 20 ekz.

Vi trovas ĉi-kune alian franc-lingvan varbilon: "*Espéranto, le monde au bout de la langue*", eldonita de *Espéranto-France*. Ĝi estas grafike tre bone farita. La

Esperanto-Grupo „La Stelo“ en Ĝenevo aĉetis stokon kaj SES transprenis la duonon de la kostoj. Ni ankaŭ uzas varbilon de Germana Esperanto-Asocio. Kial ne profiti de najbaraj landaj asocioj, se la varbiloj estas taŭgaj?

La prezo estas po 15 centimoj. Mendebla ĉe Esperanto-Grupo „La Stelo“, Case postale 188, 1211 Genève 20. Minimume po 20 ekz.

Ĉiu membro povas disdoni varbilojn. Kuraĝu kaj mendu kvanton. Dankon!

La prezidanto: Bruno GRAF.

Regiona kultura sabato

organizita de SES kaj CDELI
Biblioteko de la urbo
La Chaux-de-Fonds
17-an de novembro

Al la biblioteko per buso:

Por atingi la bibliotekon el la stacidomo, trafu la buson 4-a direkto "*Hôpital*" kaj petu la haltejon "*Bibliothèque*". Bileto aĉetblas en la buso mem.

Horaro:

09h00: Malfermo de la CDELI-salono kaj de la prelega salono Charles HUMBERT en la Biblioteko,

strato Progrès 33. Troviĝos klarigoj pri la funkciado de la eniraj pordoj ĉe la biblioteka enirejo.

10h00: Grupiĝo en la salono Charles-HUMBERT kaj salutvortoj de Bruno GRAF, la SES-prezidanto.

10h15: Unua prelego:

Martine SCHNELLER, bibliotekistino: *Kiel interrete konsultebblas la kolektoj de CDELI kaj kiel funkcias la interbiblioteka pruntoservo.*

11h00-11h15: Kafumo.

11h15: Dua prelego:

Claude GACOND: *Karakterizaj momentoj de la lingvaj luktoj en la 20-a jarcento. Hegemonio de la interregistara angla super la aliaj etnaj lingvoj kaj de la interetna esperanto super la aliaj planlingvaj projektoj. Ekzameno de la nuna internacia lingva situacio enire de la 21-a jarcento.*

12h00-12h15: Paŭzo.

12h15: Tria prelego:

Mireille GROSJEAN-ROBERT: *Re-ago de la romanĉlingvanoj koncerne al la uzo pli kaj pli oficiala de planita interromanĉa idiomo.*

13h00: *Tagmanĝa paŭzo: kuna irado al najbara restoracio italeca.*

14h30: Kvara prelego:

Kion alportas esperanto al poligloto. Intervjuo de Jean-Thierry VON BÜREN far Claude GACOND.

15h15: Diskutoj.

16h00: Konkludaj vortoj de Bruno GRAF kaj irado en la salonon de CDELI por plua babilado dum temo adiaŭa.

17h00: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Sian aliĝon oni sendu al Esperanto, Claude GACOND, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds, indikante ankaŭ sian aliĝon aŭ ne al la komuna tagmanĝo. Aliĝa poŝtkarto estis aldonita al la antaŭa *SES informas* 2001-4. Estos petata partoprenkotizo de CHF 10 por la kovrado de la organizkostoj. Sen-paga por la JES-anoj kaj por studentoj.

Speciala oferto

Eblas aboni la revuon KONTAKTO kun rabato de 20%. La jarabono kostas tiel nur 23 euroj. Necesas 6 interesatoj.

KONTAKTO estas dumonata sociokultura revuo de TEJO, kiu informas pri plej diversaj temoj el la tuta mondo, sed ne pri la movado. Kelkaj artikoloj estas verkitaj en facila esperanto. Temas pri interesa revuo por ĉiuj niveloj, rekomendita speciale al kursestroj kaj kursanoj.

Profitu de tiu favora oferto. Ankaŭ ĝisnunaj abonantoj ricevos la rabaton, se ili tion deziras. Mendebla ĉe la prezidanto (adreso sub la SES-estraro) ĝis fine de novembro.

Bruno GRAF

Donacoj

Donacoj en CHF al SES:

BEROUD Nicole, Basel: 31,50;
BUHLMANN David, Prilly: 57.50;
DOVAT Lucienne, Renens: 20;
EGGENBERGER Gertrud: Winterthur: 43.50; GLÄTTLI Ernst, Brugg: 29; KOLLER Alois, Zürich: 45;
LAUPER Elisabeth: La Chaux-de-Fonds: 22.50; MARGOT Nicole, Lausanne: 27.50; MELLINI Angelo, Hermetschwil: 25; PARZIVAL, Biel: 5; POCHANKE Stanislaw & Barbara: 96; TZAUT Olivier, La Chaux-de-Fonds: 20; WEIDMANN Dietrich, Zürich: 38,50; Sume: 461.

Donacoj en CHF al JES:

SCHNELLER Richard, Kronbühl: 20.
Sume: 20.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

Pri la ĉinnumera alvoko

Aldone al tiu ĉi lastjara numero de *SES informas* vi malkovros cirkuleran leteron de la kasistino invitanta ĉiujn ricevantojn de nia bulteno al pago de kotizo al SES por la jaro 2002, kiu ja alprosimiĝas.

Antaŭdankas la redaktoro kaj la kasistino pro la atento, kiun ĉiu certe pozitive alportos al la koncerna pagilo.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds

☎ 032 967 68 55.

Retpoŝto: gacond@bluewin.ch

Venontaj studsabatoj

Pro la transformoj, kiuj nun pozitive karakterizas la vivon de CDELI, ĝis la 17-a de novembro ne okazos studsabatoj, kaj tiu novembra havos la karakteron de SES-regiona kultura sabato.

Jam nun ĉiu antaŭsciu, ke la sabaton 16-an de marto 2001 prelegos Renato CORSETTI, la nova

prezidanto de UEA kadre de kultura aranĝo organizita de CDELI, SES kaj UEA.

Claude GACOND

JES

Junularo Esperantista Svislanda
Jeunesse Espérantiste Suisse
Junge Esperantisten der Schweiz
Gioventù Esperantista Svizzera
Giuventetga Esperantista Svizzer

c/o Vera Pochanke
Zurlindenstrasse 110
8003 Zürich

Telefon-numeroj:

hejma: +41.(0)1.451.16.51

oficeja: +41.(0)1.255.25.37

lab: +41.(0)1.255.37.87

mobike: +41.(0)79.431.53.30

veronika_p@hotmail.com

Lastaj informoj por la Ĝenerala Asembleo 2001 de JES

La Ĝenerala Asembleo de Junularo Esperantista Svislanda okazos ĉijare paralele al la Kultura Semajnfino de Esperanto-Societo Zuriko. Partoprenante vi do profitos je du aranĝoj samtempe!

Dato: 8-a de decembro 2001.

Loko: Klubejo de Esperanto-Societo Zuriko, Akazienstrasse 6 en 8008 Zürich (Tramo 2 + 4 ĝis haltejo Kreuzstrasse, supreniru la Kreuzstrasse, 2-a strato dekstre, paralele al Seefeldstrasse).

Rendevuo: Rendevuo por ĉiuj kiuj alvenos trajne estas je la 13h30 ĉe la renkontiĝpunkto de la ĉefstacidomo de Zürich.

Programo

Sabate 8-an de decembro

(Vidu ankaŭ sub la programo de la Kultura Semajnfino)

13h30: Rendevuo ĉe la ĉefstacidomo de Zürich.

14h00: Malfermo de la Kultura Semajnfino, bonvenigo de ĉiuj partoprenantoj.

14h30: Ĝenerala Asembleo de JES

18h00: Fonduo kun la partoprenantoj de la Kultura Semajnfino.

20h00: Bunta Vespero kun muziko, teatro, kaj aliaj distraĵoj.

Dimanĉe 9-an de decembro

10h30: Literatura Matenmanĝo

Tagordo de la Ĝenerala Asembleo:

1. Resumo de la momenta stato de JES. Memorigo pri la lastjaraj okazaĵoj (lastaj Ĝenerala

Asembleo, protokolo,
komitato, financoj kaj renkont-
iĝoj).

2. Decido pri formo de nova komitato kaj ĝia elekto.
3. Decido pri formo de bulteno:
 - Rubriko en SES-informas,
 - Informoj sendataj rete.
4. Financoj / Buĝeto.
5. Fikso de jaraj kotizoj.
6. Fikso de oficiala JES adreso.
7. Eventualaj modifoj de la statuto.
8. Renkontiĝoj (skisemajnfino, kunvojaĝo al internaciaj renkontiĝoj, ktp.)
9. ttt-pagxoj.
10. Kursoj, propagando.
11. Kunlaboro kun lokaj grupoj.
 - Esperanto-klubo de EPFL.
 - Esperanto-Societo Zuriko.
12. Aliaj proponoj kaj diversaĵoj.

Aliĝo:

Sendu aliĝojn kun nomo,
adreso, retpoŝto, telefono kaj
aĝo al:

Vera Pochanke
Zurlindenstr. 110
8003 Zürich
veronika_p@hotmail.com

Tranokteblecoj:

Se vi planas resti ĝis dimanĉo kaj
bezonas tranokteblecon en Zürich,
bonvolu sciigi tion al Vera

Pochanke.

(veronika_p@hotmail.com).

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

Raporto

Plensukcesa oktobra monاتفino

Same brila kiel la vetero estis la
monاتفino 'ADORU - por kune
kanti kaj mediti en teorio kaj
praktiko.

Pastoro Adolf BURKHARDT kaj
pastro Bernhard EICHKORN estis la
prelegantoj kaj gvidantoj de tiu
iom speciala ekumena semajnfino.
Pastro EICHKORN ja iniciatis la
kulturajn semajnfinojn kristanajn
en La Chaux-de-Fonds kaj estis
bela revivigo de malnova ideo.
Tute ne malnova, kontraŭe, tute
nova estas la ekumena kant- kaj
preĝ-libro ADORU, eldonita de
IKUE kaj KELI tiun chi jaron.
Sinjoroj BURKHARDT kaj

EICKORN kaptis la atenton de la partoprenantoj per siaj viglaj rakontoj pri la estiĝo de la libro en plurjara laboro, kiun ili kompilis kune kun pastro Albrecht KRONENBERGER, kiu ankaŭ prizorgis la gigantan teknikan taskon de la enkomputiligo. Ili kolektis kaj elektis kantojn - precipe religiajn, sed ne nur - el multaj kantolibroj ekde la fruaj jaroj ĝis hodiaŭ, kovrante 90 jarojn inter la baza 'Verda Kantlibreto' kaj la nova ADORU. Multaj kantoj estas nove tradukitaj, por eviti tedajn rimajojn. Aktiva kantado interplektiĝis agrable en la prelegojn kaj pruvis la belecon de la lingvo kaj muziko.

ADORU ne nur estas kant-, sed ankaŭ preĝlibro. Ĝi enhavas la liturgion kaj diservon de pluraj diversaj kristanaj eklezioj, inklusive ekz. la LIMA-Liturgion, la Liturgion de la Horoj kaj Taizé diservojn. Abundas legaĵoj el la biblio, diversaj preĝoj, kaj eĉ 'Eta Florbukedo el aliaj Religioj' trovis spacon en tiu libro, kiu estas konsiderata la plej grava verko de post la eldono de la Sankta Biblio en la jaro 1926.

La sabata programo, plena je spiritaj impresoj, kulminis en publika ekumena diservo en la kristkatolika preĝejo de La Chaux-de-Fonds, riĉigita per pluraj kantoj

el ADORU kaj la "Dimanĉa Koncerto" de Anjo AMIKA.

La dimanĉon pastoro BURKHARDT deziris reviziti CDELI-n, kiun li jam konis de antaŭaj jaroj. Sinjoro Claude GACOND afable estis preta komplezi malgraŭ la mallonga antaŭaverto, kaj poste ankoraŭ gvidis la tutan grupon ekskurse al Tête-de-Ran por promenadeto, ege ĝuita de ĉiuj.

Al niaj gastprelegantoj pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastro EICKORN, al Anjo AMIKA kaj Claude GACOND, al d-ro Giorgio SILFER pro la preparlaboroj, mi kore dankas pro iliaj klopodoj, kiuj helpis, ke tiu semajnfino iĝis evento.

Sonja BRUN, prez.

Kunvenoj

Novembre 24-25

Renkonto kun Kubo: historio, kulturo, gastronomio, muziko, danco. Mayra NUNEZ HERNANDEZ el Havano enkondukos vin en la vivon kaj etoson de Kubo. La vespermanĝo estos laŭ kuba menuo, kaj ĝin sekvos danco-vespero.

S-ino NUNEZ HERNANDEZ, profesia agronomo, nun estas instruisto de la hispana. Esperant-

uje ŝi estas la ĝenerala sekretario de IKEK. Interesatoj petu la detalan programon al KCE.

Decembre 15-16

Zamenhofologia semajnfino pri hilelismo kaj homaranismo. Antaŭviditaj prelegantoj: Mato SPEKULJAK, Giorgio SILFER, Walter ZELAZNY kaj François DEGOUL. Interesatoj petu la detalan programon al KCE.

2002 Januare 66

Ĝenerala Asembleo.

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Novembre 10: 36-a Gaja Esperanto-Rondo Instruisteca (GERI) en Zentrum Dreilinden en Rotkreuz.

La aranĝo GERI donas al la partoprenantoj eblecon praktike apliki esperanton. Ĝi taŭgas por gekomencantoj kaj geprogresintoj. Ĉiu profitas je interesa konversacio, neenuaj gramatikaj ekzercoj kaj distra parto.

GERI regule okazas printempe kaj aŭtune. Petu pli detalajn

informojn al la prezidantino de SAEF: Gertrud EGGENBERGER, laŭ la supraj adresindikoj.

SAT

SAT-Amikaro

Se la forta engaĝo je SAT (Senacieca Asocio Tutmonda) timigas vin kaj se vi tamen amas la senaciecan ideon, vi povas aliĝi al SAT-Amikaro. Estas kelkaj membroj de ĝi en Svislando. La svisa respondeculino estas Mireille GROSJEAN, poŝtfako 9, 2416 Les Brenets.

La jarkotizo estas CHF 48. Ĝi inkluzivas la ricevon de la ĵurnalo kaj de interese kaj kopiebla kaj disdoninda "*Service de Presse*". SAT-Amikaranoj kunvenas ĉiujare je pasko dum 4 tagoj ĝenerale en Francio. Mireille GROSJEAN jam partoprenis trifoje tiun aranĝon en Mittelwihr (Elzaco), en Glay (Franche-Comté) kaj en Chambéry (Savojo).

Interesatoj petu pliajn sciigojn rekte al Mireille GROSJEAN.

UEA

Universala Esperanto-Asocio

Svisa delegitino: Sonja BRUN

Waldeggsstrasse 28, 6343 Rotkreuz.

☎ 041 790 46 40.

e-majlo: smbrun@freesurf.ch

Universala Kongreso 21-28 julio en Zagreb

Kiu raportas pri Universala Kongreso, tiu devas neglekti multon, tro riĉa kaj multflanka estas la programo. Tial mi elektas kelkajn erojn, kiuj tuŝis kaj impresis min persone.

Jam en la *Dua Bulteno* mi estis ravita de la frazo: "*En Kroatio esperanto estas afero ĝenerale konata kaj pozitive taksata*". Tio montriĝis per kelkaj surprizaj faktoj: La ŝtata prezidento Stjepan MESICH mem alparolis la kongresanojn dum la malfermo. La urbestro Milan BANDICH persone ĉeestis la inaŭguron de monumento memore al la UK. La poŝto eldonis specialan poŝtmarkon multkoloran je valoro de 5 kunaoj. La kongresa insigno uzeblis kiel senkosta tram-bileto. Uzata monero 25-kuna surportas esperantan tekston. Vere kontraste kompare al Svislando!

Mi anstataŭis Mireille GROSJEAN en la komitato - la esperanta parlamento - kaj konstatis, ke ĝi laboras serioze kaj demokrate. Elektiĝis nova UEA-estraro. D-ro Renato CORSETTI (Italio) iĝis prezidanto; profesoroj Lee CHONG-YEONG (Koreio) kaj Humphrey TONKIN (Usono) vicprezidantoj; profesoro Ivo OSIBOV (Kroatio) ĝenerala sekretario. La ceteraj membroj de la estraro estas: Ans BAKKER (Nederlando), Gbeglo KOFFI (Togolando), Andrej GRIGORJEVSKIJ (Rusio) kaj Michela LIPARI (Italio). Estas ege sperta kaj kompetenta teamo. Kun granda bedaŭro la estraro anoncis la venontajn retiriĝojn de Osmo BULLER, ĝenerala direktoro, kaj de Pasquale ZAPPELLI, direktoro de la Centra Oficejo.

La komitato elektis naŭ honorajn membrojn. Kun granda ĝojo mi konstatis, ke inter ili troviĝas Claude GACOND, redaktoro de "*SES informas*", kiu dediĉis sian tutan vivon al esperanto. Li estas jam honora membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, do sviso kun internacia reputacio. SES gratulas lin tutkore.

Humphrey TONKIN gvidis la diskutojn pri la kongresa temo: Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj. Li kaptis la atenton jam dum la inaŭguro kaj allogis multajn

interesatojn, reŝovigis dumkunvene tablojn kaj homojn, tiel ke ne nur parolis oficialuloj, sed ĉiuj partoprenantoj en grupa diskutado. Li sintezis la esperanto-kulturon esence "kulturo de dialogo". La esperanta solvo konsistas el neŭtrala lingvo, kiu ebligas internacian komunikadon, kaj sub ĝi, lingvan kaj kulturen diversecojn. Humphrey TONKIN ankaŭ gvidis magie la aŭkcion, la vendadon de brokantaj libroj. Oni sentis sin en komerca cirko, kiam li fulmorapide kriis: "*Kiu donas 100 kunaĵojn, 120 kunaĵojn, ktp.*" La aŭkcio estis vera spektaklo.

Mauro LA TORRE (Italio) prezidis la Tagon de la Lernejo, kiu traktis la projekton "*Interkultura Edukado en la Jaro de Lingvoj*". Aro da instruistoj raportis pri sia laboro kaj spertoj. 100 klasoj interesiĝis kaj proksimume 50 reale kunlaboris. La klasejestroj transprenis enorman kromlaboron por sukcesigi la projekton, per informado, instruado de esperanto, kopiado kaj interŝanĝo de tekstoj kaj desegnoj. Mi memoris pri la siatempa agado de la forpasinta Marcel ERBETTA, kiu same interŝanĝis esperantigitajn kajerojn sur la moto "*Grajnoj en Vento*". Dum la konferenco la infanoj de la Internacia Infana Kongreseto paŝetis surprize sur la podion kaj prezentis

ludojn. Estis rekordo kun 50 infanoj, kiel diris Stefan MACGILL, unu el la gvidantoj.

Malfeliĉe koincidis la *Strategia Forumo* kun la *Esperantologia Konferenco*, tiel ke eblis nur parta ĉeesto, kio esprimiĝis en kritika interveno. La SAT- kaj UEA-prezidantoj kune prezidis la Strategian Forumon. Rerezentanto de UEA submetis la novan laborplanon al diskuto. Kongresano kritikis, ke strategia plano devus komenci per analizo, kiu mankas. Alia proponis malfermi oficejon por ĵurnalisto en Bruselo por profesie informi pri esperanto Eŭropan Union. La estraro konsentis pritrakti la postulojn. Dume mi paŭzis pro varmo kaj iris al la *Esperantologia Konferenco*, kie profesoro Detlev BLANKE finis sian prelegon pri esperanta lingvopolitiko. Ĉeftemo estis: *Esperanto antaŭ la sortoj kaj strategioj de senŝtataj lingvoj*. Sekvis sciencaj diskutoj. Mi sentis min kvazaŭ en universitato, kie lingvistoj dialogas en kolokvo.

Kulturaj perloj estis la teatraĵoj "La malfemilo" kaj "La plej longa tago en la vivo de Maria Teresia". La komedio "La malfemilo" de Victor LANOUX estis verkita sekve al mendo de industriisto, kiu deziris, ke pere de teatra verko estu reklamataj liaj produktaĵoj (mal-

fermiloj de viando-konservujoj). Enirante la spektantoj ricevis specon de tranĉileto. La rakonto temas pri tio, kio povus okazi al du malsamaj homoj en kondiĉo de fermiteco - kiam ili unue havas manĝo-konservujon sen malfermilo, kaj poste malfermilon sen konservujo. Tiamaniere la teatraĵo transformiĝas en metaforon pri absurdecoj de la socia vivo. Saŝa PILIPOVICH (Ĵan) kaj Iliĉ JOVANOVIĈ (Ĵak) aktoritis perfekte kaj ricevis fortan aplaŭdon. Bedaŭrinde ne ĉiuj trovis lokon en la teatrejo de la koncertejo LISINSKI, multegaj sidis en la koridoroj.

La teatraĵo *"La plej longa tago en la vivo de Maria Teresia"* de Miro GAVRAN okazis en la flavkolora Kroata Nacia Teatro, kies baroka spektejo brilas kaj pompas. La konata Vida JERMAN ludis la imperiestrinon Maria Teresia, Zarko SAVICH la impriestron Francisko Jozefo kaj Ivica PUCAR rolis kiel Ruder BOSKOVICH. Tiu dramo estis streĉa dialogo inter la plej potenca virino en Eŭropo (regis 1740-80) kaj jezuita monaĥo, sciencisto kaj filozofo, Ruder BOSKOVICH. Ŝi volis uzi liajn multflankajn sciojn kaj kapablojn por servi al siaj politikaj celoj. En la dua parto prezentigis intrigoj kaj kvereloj inter la imperi-

estra paro, veraj aŭ imagitaj. Fine dekminuta aplaŭdado. Komentisto skribis pri *"unu el la plej perfektaj en la longa historio de UK"*. Alia titolis: *"La plej bela tago en la vivo de Vida JERMAN"*.

Ne tiel grandioza estis la Internacia Arta Vespero, tro longa kaj parte sub la atendita nivelo. La koncepto estas ekzameninda. Bedaŭrinde, ke la kongresa koruso ne kantis pli longe.

Entute la 86-a Universala Kongreso estis plensukcesa. La konstanta kongresa sekretario, Nikola RASICH, meritas plian laŭron. Estas simple mirinde, ke la esperanto-movado kapablas organizi tian grandeventon. 1700 aliĝintoj el 55 landoj. Mi sentis min internacie forta, sed nacie malforta. Universala Kongreso plej bone montras la potencialon de nia komunumo.

Bruno GRAF.

Nova Estraro

Dum la Universala Kongreso en Zagrebo nova estraro estis elektita. Renato CORSETTI iĝis la nova prezidanto. Kune kun aliaj sep estraranoj li dum la proksimaj jaroj gvidos la Universalan Esperanto-Asocion laŭ la nova Strategia Plano.

En la Centra Oficejo ankaŭ estos kelkaj ŝanĝoj pro emeritiĝoj kaj demisioj de kelkaj funkciuloj.

La unua tasko de la novaj fortoj estas la efektivigo de la Laborplano 2001-2004.

Ĉiuj aktivaj svisaj membroj de UEA ricevis dum la lastaj semajnoj la inviton rektizi por la jaro 2002. La akurata pago de la koncernaj sumoj garantias la daŭre regulan ricevon de la abonitaj gazetoj kaj/aŭ la jar-, resp. gvidlibron.

UEA ekzistas pro kaj por la membroj kaj meritas nian subtenon por daŭrigi la laboron por la devastigo de nia lingvo. Dankon en antaŭo.

La Universala Kongreso 2002 okazos en Fortaleza, Brazilo, unuaranga ebleco konatiĝi kun la sudamerika kontinento. Alloga prospekto, aliĝilo kaj ĉiuj informoj haveblaj ĉe la ĉefdelegito:

Sonja BRUN.

Loka aktiveco

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunveno: 20h00 en Salono ĉe

Haltingerstrasse 97

Raporteto

Bazele ekzistas karto por junuloj. Kontraŭ CHF 30 jare junuloj rajtas iri senpage en diversajn naĝejojn, muzeojn, ktp... Ili ankaŭ rajtas viziti kursojn kun 20% da rabato. Ĉiudumonte eldoniĝas gazeto kun la plej aktualaj ofertoj. En la

numeroj januara-februara kaj marta-aprila de tiu periodaĵo "*Colour-Key*" ni propagandis por esperanto kaj ofertis 20% da rabato por sesvespera kurso kostanta CHF 40. (Necesas peti ion, sen tio ofertoj ne havas valoron, ĉu ne!). Entute aliĝis 6 junuloj.

En Weil situanta apud Basel ĉe la alia flanko de la landlimo Aneta UBIK, kiu parolas esperanton, konvinkis klaskamaradinojn lerni la lingvon. Entute 5 klasaninoj ek-lernas la lingvon. Kaj ili nun serĉas okazojn por praktiki la lingvon kun esperantaj kamaradoj el aliaj lokoj.

Fakte la intereso por esperanto kreskas ĉe la junularo. En nelonga periodo ni havis kontakton kun tri junuloj, kiuj verkis finlaboron pri esperanto por sia lernejo.

Nicole BEROUD FOCKE.

Ĉe la rominanoj

La 26-an de aŭgusto gesamideanoj renkontiĝis ĉe la stacidomo de Kaiseraugst por partopreni la Rominan Feston organizitan en Augusta Rauricorum, urbo fondita ĉirkaŭ 15 jaroj antaŭ Jesuo-Kristo. En la festejo eblis spekti romiajn metiistojn, kiuj prezentis siajn artojn kaj artaĵojn: lignaĵiston, forĝiston, kudristinojn, kuiristojn kaj multajn aliajn. Ĉiuj estis vestitaj per antikvaj roboj. Eblis gustumi specialaĵojn: panon, mielon, hidromelon, fisaĵojn tre bongustajn. Iuj prezentis tipajn romiajn ludojn faritajn per ŝtonetoj movataj sur cirkloj. La vetero varmegis, la publiko abundis, tial necesis ŝvite longe viciĝi por akiri manĝaĵojn. Posttagmeze post vizito de la renovigita amfiteatro la samideana grupo estis regaligita en apuda trinkejo.

Laŭ André GROSSMANN

Venontaj kunvenoj

Novembre 22: Monata kunveno: Pretigo de la programo 2002.

Decembre 15: Zamenhofa-festo en Mulhouse, kun junulara programo.

2002 januaro 24: Monata kunveno: Ĝenerala jarkunveno.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève.

Raporto

Prelego "*La vérité sur l'espéranto*" de Claude Piron:

55 personoj ĉeestis tiun ĉi prelegon kaj pozitiva konsekvenco estas 16 aliĝoj al la kurso por komencantoj ĉe Université populaire. Tre pozitiva estis la reago al la donacalvoko por la kovrado de la enormaj kostoj en rilato kun tiu prelego: ili sumas CHF 1'205.

Venontaj renkontoj:

Novembre 5: restoracio "Aux Cheminots": vespermanĝo ekde la 19h00, kunveno ekde la 20h00.

Decembre 4: restoracio "Aux Cheminots": vespermanĝo ekde la 19h00, kunveno ekde la 20h00.

2002 Februare 5

Marte 5: Ĝenerala jarkunveno.

Aprile 3.

Maje 7.

Junie 4.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Decembre 16: Zamenhofa festo.

2002 Januare 7: Kun Yvette GOY: krucvortoj kaj krucvort-enigmoj.

Februare 4: Ĉiuj al la Ĝenerala Asembleo.

Marte 4: Kun Charlotte BLANC: Sankta Jakobo de Kompostelo.

Aprile 8: Gramatikumado.

Evoluo ĉe EPFL

Interesa prelego de Claude PIRON altiris studentojn de EPFL/UNIL kaj

membrojn de Laŭzana Esperanto-Societo, la 30-an de oktobro. "Esperanto kaj la eŭropa lingva problemaro" estis lia temo. La aŭskultantoj povis noti klarajn argumentojn favore al la enkonduko de esperanto en la laborlingvaron de la Eŭropa Unio. Sekve, nia grupo atendas aliĝon de novaj interesiĝantoj el la ĉeestintaro.

Baldaŭa daŭrigo de esperanto-kursoj ĉe EPFL

La oficialigo de la altlerneja grupo GEE (Grupo Esperanto EPFL) estas survoje.

Post akcepto, kaj se estos sufiĉe da lernantoj, verŝajne eblus organizi la kursojn kadre de la Lingva Instituto de EPFL.

Stefano KELLER, kursgvidanto.

KORESPONDPETO

Max MADORO, PO-Kesto 151, Musoma, Tanzanio, esperantiĝis en 1999, li serĉas korespondantojn per esperanto. Li estas kontisto en katolika paroĥo kaj ankaŭ gvidas la neregistaran organizaĵon Zinduka (vekiĝo), kiu laboras helpe al homoj loĝantaj en vilaĝoj sen necesaj servoj por sano, eduko kaj trinkakvo. Li ankaŭ okupiĝas pri virinaj aferoj en Tanzanio.

Rete: rumadoro@yahoo.co.uk

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Kial oni lernas esperanton?

Mi frekventas la lernejon Kollegium St. Fidelis en Stans. Ni ricevis la komision skribi laboron por la abiturienta ekzameno antaŭ proksimume unu jaro. Oni povas libere elekti la temon. Do por mi estis klare sufiĉe rapide: *Esperanto*.

Ĉi tiu teksto estas la produkto de mia laboro. Ĝi estas tradukita el la germana lingvo en la esperantan de mi, kunhelpe de esperantistoj.

Kiam mi devis serĉi la temon por la laboro, mi havis subitan ideon: Esperanto. La ekpuŝon al tio donis la muzikgrupo "*Freundeskreis*" al mi. En la jaro 1999 ĝi publikigis Kompakt-Diskon kun la titolo: "*Esperanto*". Por eltrovi pli pri tiu

temo, tiu laboro prezentis konvenan okazon. Antaŭ ĉio mi havigis ĝeneralan superrigardon helpe de multaj informoj. Sed amasiĝis tiom da informoj, ke mi devis limigi forte la temon.

Krome kondukas demandon postulis la starigtasko. Tiu devus formi ruĝan fadenon tra la tuta laboro kaj ĉe la fino devus ekzisti pri tio rezulto. Mi decidis por la demando: Kio estas la motivo por homoj en la hodiaŭa tempo lerni esperanton? Ĉi tiun demandon mi intencis starigu al diversaj esperantistoj (antaŭ ĉio) en Centra Svislando.

Dank' al mia jam kolektita scio, mi respondis unue tiun demandon sen esti konsultinta esperantistojn. Mi venis al la respondoj: la komunikado kun la tuta mondo okupas certe la unuan lokon. Efektive mi pensas ankaŭ, ke kun esperanto la kompreno inter la homoj estas helpata. Trie oni lernas esperanton, mi pensas, ĉar esperanto kontribuas certan parton al la mondpaco (sekve ĉiu esperantisto kontribuas ion por tio) kaj kvare ĉar parencoj kaj/aŭ konatoj jam parolas esperanton kaj ĉar ili faris kun tio bonajn spertojn.

Poste mi iris el la serĉo de esperantistoj kaj mi starigis mian demandon. Nun mi povas diri, laŭ la konkludoj: Miaj atendoj montr-

iĝis proksimume ĝustaj. Multaj homoj lernis esperanton por komuniki kun homoj el la tuta mondo. Ankaŭ por la kompreno inter la homoj kelkaj esperantistoj lernis esperanton. Sed tre grandaj motivoj estis antaŭ ĉio parencoj kaj konatoj, kiuj jam parolis esperanton aŭ anoncoj por esperanto-kurso en gazeto. Sed efektive mi trovis neniu, kiu lernis esperanton nur por la kontribuo al la mondpaco.

Por fari la enketon mi bezonis multajn homojn, kiuj helpis al mi. En la Lucerna Esperanto-Societo mi estis tre bone akceptita. Pro tio mi ŝatus danki ankoraŭfoje. Kompren-eble mi ankaŭ ŝatas kore danki al miaj instruistoj, Martin Meyer kaj Sonja Brun, pro iliaj klopodoj.

Maurus BRÜLISAUER, Stans.

Venontaj kunvenoj

Novembre

07: en Simplon.

15: ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: kompilado de la programo 2002.

Decembre

05: merkrede 14h00-16h00 en Simplon: Zamenhofa posttagmezo kun Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN.

2002 Januare

09: en Simplon.

18: vendrede 19h30: paroliga leciono, 20h00: Vojaĝo tra Venezuelo kun Margrit E. BRÜGGER.

Kantono de Neuchâtel

Surstrata agado en La Chaux-de-Fonds.

Kadre de la eŭropa tago de la lingvoj 5 personoj disdonis informilojn pri esperanto sabate matene la 29-an de septembro en La Chaux-de-Fonds. Partoprenis Marlène kaj Willy PERRET-GENTIL el Hauterive (NE), simpatiantoj, Mario kaj Romain Bélisle, kaj Mireille GROSJEAN. La disdonita materialo konsistis el informiloj de SAT-Amikaro. Romain (3-jaraĝa, dulingva franca-esperanta) klarigis: "*On va disdonner des papiers!*" Disdoniĝis hore po 100 informiloj, sume 500. Kelkaj personoj ne prenis la informilon, multaj akceptis ĝin, kelkaj laŭdis la agadon, neniu tuj forĵetis la paperon.

Mi foje diris: "*Ni decidis ne meti ien iun bombon por aperi sur la unua paĝo de ĉiuj ĵurnaloj, sed informi vin per disdonado de informiloj!*" Je tio ĉiuj alparolitaj personoj samopiniis.

Mireille GROSJEAN.

Tutsvisa kongreso de la junularaj parlamentoj

La Chaux-de-Fonds, 26-28 oktobro

Mireille GROSJEAN ekrlatis kun la organizantoj de tiu kongreso kaj atingis, ke ĉiu partoprenanto ricevis informilon pri esperanto en sia baza por-kongresa informilaro. En la franca (50 ekz.) temis pri "*C'est quoi, l'espéranto?*" de JEFO kaj dorsoflanke "*Savez-vous que...?*" de Mireille GROSJEAN. En la germana (80 ekz.) temis pri "*Esperanto, die andere Sprache*" verkita de Andy KÜNZLI dum sia tiama kunlaboro ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds.

Studaj rondoj ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

Studrondo

La studrondo reokazos post la oktobraj ferioj ĝenerale la 2-an kaj 4-an mardon de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND. Interesatoj notu kaj rezervu la sekvajn datojn:

Novembre 13 kaj 27.

Decembre 11.

2002 januare 8, 22.

Februare 12.

Marte 12.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Novembre 7: Esperanta gazetaro kun Stanislaw POCHANKE.

Decembre 5: Zamenhofa Vespero.

2002 Januare 2: renkontiĝo kun Ernst VON MAY en la flegodomo "Sonmat", Niederuzwil.

Februare 6: Jarkunveno kaj kompilado de la programo 2002.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
☎ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an mardon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

Raporto

Okaze de la Internacia Tago de la Lingvoj Esperanto-Societo Zürich invitis al prelego kaj forumo pri

multlingveco. Ĉar la tago estis ombrigita de la teruraj eventoj de la 11-a de septembro, ni ne povis ĝin tiel anonci, kiel ni antaŭe planis. Niaj klubanoj multnombre venis, sed bedaŭrinde nur malmultaj ne-esperantistoj partoprenis la eventon. Kiuj sekvis la forumon, tiuj foriris kontentaj fine de la vespero. La ĉe-estantoj eklernis multon pri la aspektoj de multlingva societo, pri la akiro de fremdaj lingvoj kaj pri la perspektivoj de esperanto en multlingva societo. La prelego de Dietrich WEIDMANN fakte ja povus esti interesa por aliaj lokaj grupoj, kiuj do povos foje profiti de ĝi.

La estraro de ESZ.

Kunvenoj

Novembre

Marde 13: monata kunveno:

19h30: konversacia rondo por ekzerci la lingvon.

20.00: prelego kaj analizo pri la temo "vendado de esperanto".

Decembre:

Sabate 8 kaj dimanĉe 9:

Orientsvisa Kultura Semajnfino de SES kaj ESZ. vidu la koncernan aldonitan verdan informan folion.

2002 Januare:

Marde 8 19h30: konversacia rondo,
20h00: monata kunveno.

Libroj

Studoj pri interlingvistiko Studien zur Interlinguistik

Raportas Richard SCHNELLER

Festlibro por Detlev BLANKE. Redaktis Sabine FIEDLER kaj Liu HAITAO. Eldonejo Kava-Pech, Dobřichovice (Prago), 2001. Dulingva verko kun resumoj en la lingvoj esperanta, germana kaj angla. 736 paĝoj.

Foliumante tiun libron oni tuj vidas, ke interlingvistiko kovras larĝan spektron da diversaj fakoj: lingvoplanado kaj lingvopolitiko, esperantologio, terminologio, leksikografio, tradukscienco, historio kaj aplikaj aspektoj. Do ne temas nur pri lingvistiko ĵonglanta per leksemoj kaj morfemoj aŭ aliaj signifantoj kaj signifatoj!

Antaŭ sesdek jaroj, la 30-an de majo 1941, Detlev BLANKE naskiĝis en Neumünster (Norda Germanio). Li doktoriĝis en 1976 en Humboldt-Universitato (Berlino) per disertacio pri kompara vortfarado de esperanto kaj la germana kaj en 1985 habilitiĝis per disertacio pri planlingvoj ĉe la sama

universitato. Estis la unua habilitiĝo pri interlingvistiko mondscale.

Lia scienca laboro neniam estis kaj estas memcelo. Kiel plentempa sekretario de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana Demokrata Respubliko li atingis certan socian agnoskon de esperanto en GDR kaj sub lia redaktado (1970-1990) de la revuo «der esperantist» la asocio akiris apartan profilon. Kiel vic-prezidanto li helpis la senkonfliktan unuiĝon en 1991 de la orient- kaj okcidentgermanaj esperanto-asocioj.

Detlev BLANKE ne nur direktas sin al la lingvistoj, ne sufiĉe okupiĝintaj pri la planlingva fenomeno, sed ankaŭ al esperantistoj, kiuj ne malofte adeptas al mitoj kaj troigoj pri sia lingvo kaj ignoras sciencan laboron. La festlibro kompreneble enhavas ne nur enkondukan biografion, sed ankaŭ je la fino bibliografion de la jubileulo. Interalie li aŭtoris la bazan enkondukan verkon «Internationale Plansprachen».

La pritraktita temaro de tiu libro estas multaspekta: tempe ĝi iras de la bibliaj tradukoj esperanten ĝis interlingvistiko en informadiko kaj interreto,

space plej diversaj lingvaj kulturoj tuŝiĝas. La aŭtoroj ĝenerale estas fakuloj je universitata nivelo kaj la temoj science pritraktataj ne ĉiam facilaj, sed bonvola leganto povas eltiri multajn utilajn detalojn pri historio, sociologio kaj politiko de planlingvoj aŭ etnaj lingvoj (esperantologio tamen ampleksas 300 paĝojn!) kaj ne mankas literaturaj analizoj. Fine oni trovas indeksojn kaj indikojn pri la kontribuintoj.

Recenzon de tiu volumego mi lasas al kompetentuloj. Eĉ ne eblas ĉi tie doni la kompletan liston de la diversaj aŭtoroj kun la titoloj de iliaj kontribuoj, ĉar la enhavtabelo ampleksas du paĝojn. Tamen mi menciu pli malpli arbitre kelkajn erojn ĉu en esperanta aŭ germana lingvo.

La kontribuo de Zbigniew GALOR «Esperanto-movado: Ĉu perdita komunumo?» enhavas sociologian analizon de la nuntempa movado, sed ankaŭ komparon kun tiu de la antaŭa 20-a jarcento. Li kritike pritraktas nociojn kiel «diasporo», «finvenkismo», «raŭmismo» ktp. Konkluda citaĵo: «*Enkadre de la E-movado okazas ŝanĝoj, kiuj signifas ankaŭ perdon de certaj, ĝisnunaj agad-* kaj

organizaj formoj de E-komunumo. Ĝi mem ŝanĝiĝas. Pensado pri ĝi bezonas klaran distingon inter malnovaj kaj novaj formoj en kiuj ĝi ekzistas kaj konscion, ke nek universala E-komunumo, nek E-movado estas donitaj unufoje por ĉiam; ili povas samegale esti en retroiro, krizo, povas malaperi aŭ evolui.»

La lingvopolitikaj artikoloj ja konstatas la hegemonion de la angla ankaŭ en Eŭropo, sed ekzemple Werner BORMANN en «Verschiebungen im Machtgefüge» esperas plifortiĝon de la Eŭropa Unio konkurence al la monda potenco Usono kun la eblo, ke estiĝos novaj ŝancoj por esperanto kiel elprovita neŭtrala solvo de la lingvo-problemo.

Oni trovas kontribuojn pri tre aktualaj temoj, ekzemple pri la esperantlingva komunikado per interreto, la aplikado de informadiko al tradukado kaj leksikografio. Sed, kiel Ilona KOUTNY en «Defioj de moderna leksikografio por Esperanto» konstatas, «...la teknikaj ebloj ne malnecesigas la skrupulan kaj konsciencan vortaristan laboron, nur helpas ĝin».

Plurfoje oni ankaŭ substrekas la neceson de centroj de dokumentado kaj esplorado pri planlingvoj. En sia artikolo «Forgesita panslavisma volapukisto», Věra BARANDOVSKÁ-FRANK opinias, ke «la arĥivo de CDELI estas frandaŝtrovejo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de planlingvoj». Probable tion povos konfirmi Andy KŪNZLI, kiu kontribuis per la artikolo «René DE SAUSSURE (1868-1943) – Tragika sed grava esperantologo kaj interlingvisto el Svislando».

Fine mi tamen devas menci, ke en tiu impona libro kun bela verda kovrilo oni malkovras relative multajn tipografiajn fuŝojn : ĉu pro amatoreco, ne-taŭga programaro aŭ nesufiĉa kontrolado? Ekzemple: kien formalaperis la mankanta teksto ĉe la paĝoturnoj 61/62 kaj 63/64, kaj kio okazis al la piednotaj ciferoj aŭ tro grandaj aŭ perturbintaj la interlinian spacon? Ke parto de la bibliografio sur la paĝoj 520/521 aperas duoble ne estas tro ĝena, nur superflua. Malgraŭ tiuj ne-perfektajoj ĉi libro estas serioza verko kun studinda materialo por ĉiu interesulo pri la lingvo-

problemo sub plej diversaj aspektoj.

Richard SCHNELLER

-oOo-

Rakonto

Renkonto plej malverŝajna

Gilles Cantagrel

Kelkfoje okazas mirakloj. La renkonto de du majstroverkistoj ŝajnis longtempe nebla: Johán VALANO zigzagante sur nia terglobo neniam trovis liberan lokon en sia agendo, dum Georgo E. MAŬRA neniam forlasis Panamon kaj duonvoĉe solis. Sed feliĉa okazo prezentigis, kiam sur la Kanariaj Insuloj la eldonisto de «Stafeto» alvokis siajn aŭtorojn per «Helpu pluporti la torĉon!» ... Kaj ili venis el la kvar anguloj de la mondo al la Floraj Ludoj! Jen do la rakonto pri la renkonto de du gravuloj el du plej malsamaj skoloj: la *abisma* kaj la *bebisma*.

Ne plu necesas prezenti la du protagonistojn: Johán VALANO, specialisto de la valanaj lingvo kaj filozofio, kaj Georgo E. MAŬRA, profesoro pri la panama lingvo kaj kaloĉjologo [kal-oĉjo-logo].

J. VALANO: Mi ĝoje salutas vin kiel vera(n) poeto(n) kaj mia admiro estas senlima! Ĉu vi permesas, ke mi prezentu mian filozofian sistemon? Laŭ mi gravas la bona lingvo, sed antaŭ ĉio la bona demando. Ĉu ne ĝusta demando jam duone solvas filozofian problemon? La esencajn demandojn de la homa ekzistado oni povas resumi per la kvintesenco:

1. Ĉu li venis trakosme?
2. Ĉu li bremsis sufiĉe?
3. Ĉu ni kunvenis vane?
4. Ĉu vi kuiras ĉine?
5. Ĉu ŝi mortu trafike?

G. E. MAŬRA: Eksterordinare, tiu aristotela logiko! La unua kaj la kvina punktoj interrilatas, temas pri naskiĝo kaj morto, la dua kaj la kvara pri lingvo kaj la tria kaj centra estas la plej grava, ĉar aktuala kaj samtempe eterna demando. Tamen, ĉu ne estas preseraroj? Ŝajnas al mi, ke devus esti: Ĉu ŝi mortis tragike?

VALANO: Ne ne, mi klare klarigis tion al vi. La valana lingvo preskaŭ ne estis influata de la latina. Sed tamen okazis memorinda historia epizodo. Kiam CEZARO venkis la dekfoje malplimultnombrajn valanojn, li koncize diris: «Mi venis, mi vidis, mi trafikis» Kaj tiu lasta vorto eniris la valanan.

MAŬRA: Efektive li efike trafikis! Mem Georgo PETERIDO PENETER ne estis tiel rapidpenetra!

VALANO: Jen, jen ... sub via profesora mieno kaŝiĝas homaj instinktoj! Sed ne miskomprenu la sencen de tiu fama eldiro! Fakte Cezaro aludas per ĝi la trafikon postbatalan, kiu portis lin en venka pozo parade sur romia ĉaro tra la mallarĝaj stratoj de Bruselo. La romfidelaj flandroj freneze aklamis lin kun nepriskribebla entuziasmo.

MAŬRA: Jen denova pruvo pri la saĝo de la antikvaj aŭtoroj, kiuj instruis, ke teksto havas almenaŭ tri sencojn: laŭvortan, laŭsignifan kaj simbolan. – Vi sciuj, ke amiko WARINGHIEN detale eksplikis al mi la gravecon de la «ĝusta vorto» ...

VALANO: Pa! Mi havas nenion kontraŭ la persono WARINGHIEN, sed li estas pura produkto de la franca eduk-sistemo. Tiu estas la plej malbona, simila al bredejo de papagoj! La profesoro papagas, kion li lernis antaŭ tridek jaroj, la studentoj senĉese papagas, la instruistoj papagas siavice ... ne miru, ke la lernantoj ankaŭ papagas! La emblemo de Francio tute ne estas koko, sed papago! Kaj jen venas francoj en la Akademion kaj papagas: ili dekretas ĉion ajn, benas ĝin *urbi et orbi*, punkto, fino! Kvankam ZAMENHOF diris, ke plena vortaro ne eblas, tiu impertinentulo sankta Gastono pap-agis: li svingis glason da ĉampana vino kiel incensilon super stoko da manuskriptoj du futojn alta, faris nekompreneblan framasonan signon kaj elpafis la

revolucian devizon: «Piv-Pag! Libero, frateco, egaleco!» Kia blasfemo prononcita de lingva aristokrato! Tio vere ofendas mian komprenon de la «reala lingvo». Li male devintus diri: «Mallibereco, nefrateco, senegaleco!»

MAŬRA: Ĉu vi ne estas tro severa kun viaj kritikoj? KALOĈAJ, PIĈ, DE DIEGO kaj aliaj iberianoj aŭ iltisanoj ne suferis pro la franca eduk-sistemo.

VALANO: Ili tamen estas franco-maniuloj okcidentkulturaj kaj elit-ismaj! La franca lingvo estas tro intelektula, preciziga, dum la valana multe pli uzas la dekstran flankon de la cerbo, pli malpreciza, sed pli intua kaj ĝeneraliga, perfekta ilo por esprimi sentojn kaj emociojn.

MAŬRA: Same la panama tute taŭgas por redoni sentojn kaj emociojn. Permesu, ke mi citu poemon en la traduko de mia kun-geniuo KALOĈAJ:

La ĝema son'

de gramofon'

saksofona

min vundas ĝis

cerbuma kriz'

monotona.

VALANO: Trafe, jes, tiu suverena KALOĈAJ! Tamen mi proponas anstataŭigon de «monotona» per «unutona», ĝi estas pli en la spirito

de la lingvo kaj cetere tion konsilas al mi mia menso. Plue pikas mian lingvokonsciencan la foresto de mal-vorto. Mi malmalice rimarkigas al vi, ke tiurilate mi estas tradiciulo kaj sekvas la simbolon de la familia blazono: sovaĝa pomarbo (Pirus malus).

MAŬRA: Mi komprenas viajn skrupulojn. Ankaŭ min kelkfoje forlasis la ĝusta lingvosento. Ekzemple se GRABOWSKI tradukis poemon de LONGFELLOW, kiu komencas jene: «La tago malvarma, malgaja, sensuna ...», mi iam opiniis ke tio pli similas al priskribo de sunoplana tago!

VALANO: Ne bedaŭru, ankaŭ al WARINGHIEN okazis similaĵoj, ĉar mankis al li la sento de la parolata lingvo, li nur legis kaj skribis, legis kaj skribis ... kaj ne atentis la babil-aĵojn ĉiutagajn.

MAURA: Kara amiko, finfine ni devas ami ĉion: ami panon, ami piron, ami amikinojn! Almenaŭ tio estas nia panama vivovojo: panam-amo!

VALANO: Jen vi tuŝis la sentivan klavon el mia anima klavaro de plifeliĉigisto! Al tiu idealo mi dediĉis mian tutan vivon.

MAŬRA: Vi certe scias, ke miaj rilatoj kun KALOĈAJ estis tre amikaj kaj profundaj, same frataj kiel kun WARINGHIEN. Nia triopo perfekte akordiĝis, ĉar ni estis tri poetoj. KALOĈAJ tradukis la satanan parton de la «Dia Komedio», nome «La

Inferon», dum Li, SAT-ano, preferis «La Dekameronon» pli proksima al Liaj inklinoj. Mi nur modeste verkis originalajn poemojn. – Sed urĝas nun konsideri vian epokfaran verkon «La bona Limigo»: mi admiras vian virtuozecon en la koncizo!

VALANO: Mi do verkis furoran romanon per nur 460 radikoj, dum ordinara verkisto bezonas minimume la duoblon. Sed mi certas, ke venos alia geniulo, kiu ankoraŭ pli perfekte eluzos ĉiujn latentajn eblojn de la valana lingvo: li kreos romanon per nur 46 radikoj! Al tiu geniulo mi ebenigis la vojon, sed mi ne indas malligi liajn sandalŝnurojn. Mi nur profete vin admonas: «Pentu kaj ŝanĝu vian lingvon, ĉar venos pli granda ol mi, kiu senerare juĝos vian misuzon novvortan!»

MAŬRA: Tiel estu!

VALANO: Cetere mi ne volas persone ataki WARINGHIEN. Fine li iĝis tiu, kiun la okazaĵoj de la vivo kaj la medio faris. Ni homoj estas nur duone liberaj, ĉu ne? Simple mi rimarkigas al vi, ke la francoj estas ege maltoleremaj, eĉ kun siaj propraj infanoj. Ekzemple, se eta infano diras al sia patrino: «Panjo, mi deziras pomon!», la patrino tuj severe korektas ĝin: «Joĉjo, mi jam milfoje diris al ci, ke en tiu kazo ci devas diri «Panjo, mi deziras piron!» – Dum la malfeliĉa bubo volis frandi pomon! Kia daŭra frustraĉado!

MAŬRA: En via ĉefverko bonlim-
iga vi skribis, ke en la valana lingvo
neologismoj ne necesas, ke nov-
vortoj senutilas.

VALANO: Efektive, ni devas liber-
iĝi el la naturalisma malliberejo, en
kiun iuj volas ŝlosi nin poreterne.
Nia modelo povus esti la ĉina
lingvo, la plej liberama, permesema.
Ekzemple ili povas tute libere decidi
ĉu «maj» aŭ «maj».

MAŬRA (skeptike): Ĉu? ...

VALANO: Jes, vi eble rimarkis, ke
mi levis la tonon ĉe la unua «maj»
kun la signifo «vendi», dum mi ĝin
mallevigis ĉe la dua «maj» signifanta
«aĉeti».

MAŬRA: Mirinde ekzotika muziko ...
sed kiu rilato kun libera esprimado?

VALANO: Se ili diras «maj-maj»,
tio signifas «komerci». La ĉinoj
estas la plej feliĉaj homoj, ili rajtas
libere komerci, dum la francoj estas
kartezianoj, ili nur strikas kaj kart-
ludas!

Jen alia sperto. Kiam mi estis buŝ-
tradukisto ĉe UN, mi devis traduki
de la angla francen por gravaj ŝtat-
istoj, kiuj interparolis en la
koridoroj de la UN-sidejo en Nov-
Jorko. Tony BLAIR kun sia larĝa
rido diris al François MITTERRAND:
«What you see is what you get,
thank you!», kiun mi iom libere
tradukis per: «Ni ambaŭ tre bone
akordiĝas, mi petas vin!» La tipe
franca intelektulo MITTERRAND

poste min demandis: «Kion li petas
de mi?», ĉar la francoj en tiu kazo
stereotipe diras: «Mi dankas vin» Ili
ne toleras la liberan uzon de «peti»
kaj «danki»!

Povas esti, ke mia malŝato de la
francaj intelektuloj originas el jun-
infana traŭmo. FREUD ie parolis pri
la «patra imago» kaj JUNG pri
«projekcio», sed ni lasu tiujn
pedantajn germanajn filozofojn.
Cetere ni neniam plene komprenos
niajn ag-motivojn dum nia subsuna
kaj subluna estado. Pro tio mi tre
ŝatas la unuverson de Ariel BEN
GUNI:

*Anofelo lasta zumas super la
lasta gazelo.*

Ĉu ne korŝira etoso mondoŝina?

MAŬRA: Jes, kortuŝa ... Tamen, ni
pozitive kiel instruis al ni la panama
majstro Coué GUEVARA : ni forgesu
la zorgojn niajn ĉiutagajn! Mi
invitas vin manĝi ĉinan fonduon. Mi
ne kuiras ĉine, sed mi levas glason
da rizvino kaj tostas al via sano, pli-
feliĉiganto!

VALANO: Mi petas vin ... ne ... tio
estas valanismo ... mi dankas vin: je
via sano!

-oOo-